



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

J A R A B O N O :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Simpla : 5 fkoj / Epineux-le-Seguin (Mayenne)
Bonfara : 10 fkoj / C. C. P. Nantes 2349-62
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MAJO - JUNIO

1964

3

KULTURAJ KAJEROJ

1964

Majo - Junio

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rocheport-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

..

Kosmo kaj revo

P. BABIN

Esperanto tra la mondo

Mirinda loko

Sankta Mikaelo monto (1) B. CHEVERRY

La historio de...

La skota viskio

Monako - Monte-Karlo (1) Monaka E. GRUPO

El ie en la mondo

La prapatro de la radio
Barro Colorado P. BALKANYI
H. KOIVU

Leonardo da Vinci...

en Turanĝio E. MOTILLON

Gravaj datrevenoj

Por via distro

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

Kosmo kaj Revo

Kiam vi vidas sur ekrano viron, kiu surmetas la kaskon de spac-skafandro ĉu vi ne pensas pri mezepoka kavaliro surmetanta sian helmon? Ĉu leginte fikcio-romanon pri spac-vojaĝoj vi ne memoras la « Oran Felon », « La Vojaĝon de Gulliver », kaj « Robinson Crusoe »? Sajnas, ke la emo al aventuro kaj al malkovro reviviĝas, renoviĝas. En ĉiuj tempoj la homoj emis al forkuro el la ĉiutaga vivo per diversaj rimedoj. La sukceso renkontita de la esplor-literaturo kaj de la « vestementoj », tiuj filmoj, kiuj montras la longajn rajdadojn de la orienta al la okcidenta marbordo de Usono, esprimas tiun altiron al la aventuro, al la nekonato. La rajdantaj pioniroj haltis ĉe la Pacifika marbordo; sed la aventuro daŭras, ĉar de tiu marbordo ekflugas nun spacraketoj. La « nekonataj landoj » ne plus havas sekreton por la pli multo kaj la vesterno ne plu plenigas la kinejojn per amaso da homoj. Oni nun entuziasmiĝas pri la raketoj kaj astronautoj. Novaj Homeroj baldaŭ rakontos la malkovrojn, la aventurojn, la triumfojn kaj tragediojn de la unuaj vojaĝantoj al la Luno, Marso aŭ Venuso, renoviĝas la epopeon kaj la sagaon.

Sed tiuj, kiuj havas pli praktikajn emojn demandas: « Kion alportos al ni, homoj, tiuj entuziasmigaj sed tiom kostaj spacvojaĝoj? » La grandegajn elspezojn ne pravigas nur la antaŭdiro de la vetero aŭ la plibonigo de la komunikado inter la kontinentoj. Nur malgranda parto de la homaro interesiĝas pri la teknikaj kaj sciencaj malkovroj, kvankam ĉiuj homoj povas esti multe influataj de ili. Ĉar laŭ la nunaj teknikaj konoj, ne sufiĉas la militaj buĝetoj de ĉiuj nacioj por ĉiutage sendi dekon da homoj al la Luno. Se la progresado de la tekniko ebligas la malplialtigon de la « vojaĝ- » kostoj al la Luno la homoj povos vivi tie nur dank'al multege kostaj aran-

ĝoj. Do, kiun intereson prezentas la spac-vojaĝoj, se oni flankenlasas la eble ne tute pacemaj celoj?

La ekzistado de ekster-tera vivo estas la ĉefa problemo. La ŝanĝigo de la koloro de Marso laŭ la sezonoj montras, ke verŝajne ekzistas tie ia formo de vegetado. Pro tio povas ekzisti ankaŭ iaj vivo-formoj. Kontakto kun tia nehoma civilizo estus granda evento, kies konsekvencoj povus esti ege bonaj aŭ malbonaj. Sed la influo de eĉ malaperinta civilizo estas ĉiam ege emociiga kaj alportas grandajn ŝanĝojn; la eŭropa Renesanco okazis sekve de nova malkovro de kulturo jam miljara. Kiam niaj arkeologoj atingos Marson, eble ili trovos tie heredaĵon tiel gravan, kiel la greka kaj la latina estas.

Ekzistas aliaj planedoj ol Marso kaj Venuso. Kompreneble ili kuŝas milionoble pli malproksime ol la supre cititaj. Sed kion la homoj ne povas rekte fari, tion elektroniko permesas. La radio-teleskopo eble fariĝos la unua kontaktilo kun ekster-tera inteligenteco. Dank'al ĝi, tra la kosmaj eksplodoj venos al ni etaj ritmaj pulsoj, kaj ni tiam scios, ke ekzistas aliaj « mensoj » ol la niaj, ke ni estas reĝoj nur sur eta ero de la Universo.

Simila situacio renkontiĝis nek en la historio nek eĉ en la prahistoria tempo. Se ni konsentas pri la teorio, ke nia homaro devenas de maraj estaĵoj, ni povas diri, ke renkontiĝis simila situacio, kiam nia « rampa prapatro » eliris el la akvo por vivi sur la tero. Ĉu la vivo sur la tero estas nur ĉenero inter la vivo en la maro kaj la vivo en la steloj? La demando estas reviga. Pro tio mi faras ĝin, ĉar la homo bezonas iom da revo.

Pierre BABIN.

ONI INFORMIS NIN PRI LA MORTO EN TOKIO, de Prof. Hideo Yagi, kiu ĝis antaŭ tri monatoj estis prezidanto de U.E.A., kaj demisiis pro sia malbona stato.

Kulturaj Kajeroj esprimas siajn kondolencojn al la familio, al la japana esperantistaro kaj al U.E.A.

Esperanto tra la Mondo



La universala kongreso en Hago

Pli ol 2.000 partoprenantoj estis jam enskribitaj meze de aprilo.

En la kadro de la Internacia Somera Universitato okazos prelegoj de 8 profesoroj el 6 landoj.

Ĉirkaŭ la kongreso

Foto-konkurso Gevaert kun gravaj premioj okazos de la universala kaj junulara kongreso (regularo en « Esperanto » de Majo).

Riĉa programo ankaŭ disvolviĝos dum la junulara kongreso (8-15-8) kiu okazos en la Anne-Frank-Domo de Amsterdamo. Post tiu kongreso, estos eble restadi en tre pitoreska junulara hotelo : « La Drommedaris » en Enkhulzen.

Aliaj someraj manifestacioj por la gejunuloj

Internacia Esperanto-Tendaro por gejunuloj, 12-26-7, en Cielochocinck (Pollando). Tute speciale por studentoj.

La Bulgara Esperanto-Junularo organizos internacian seminarion pri la temo « Vojoj al internacia interkompreniĝo » (16-22-7) en Primorsk, ĉe la Nigra Maro.

Estus tre dezirinde ke la junaj geesperantistoj frekventu — la restadejojn kaj kamplaborejojn de la organizo « Moulin des apprentis », Bonnat (Creuse), Francujo, kiu tre favoras nian movadon. Petu informojn!

...kaj jam notu : « Internacia Skiferio », en Adelboden (Svisujo), 27-12-64, 4-1-65.

La Internacia Arta Teatro prezentos...

...dum la universala kongreso : « La Amo de Don Perlimplin » de F. Garcia Lorca ; « La Edziĝpropono » de Ĉekov ; « La leciono » de Ionesco ; « Senelirejo » de Sartre ; « La morto de lia Ekscelenco » de Matkoviĉ.

La vivo de U.E.A.

El la lasta kunveno de U.E.A., ni notas la jenajn decidojn :

La movado partoprenos en 1965, la « Jaron de Internacia Kunlaborado » de U.N.O.

Aperos trionjara « Lerneja Bulteno » en la kadro de la revuo « Esperanto » por apogi la laboron de la nove formita « Konsulta Komisiono pri lernejoj ».

Dua konferenco de lernejoj en kluj esperanto estas instruata, okazos dum 1965 en Britujo, versajne en Londono.

La estraro, por helpi la agadon en Azio, jam eldonis vortareton esperanta sinhalan ; baldati sekvos simila lernilo esperanta-bengala.

Jam presata en Finnlando estas la plej nova volumo en la serio « Oriento-Okcidento » sub aŭspicio de U.E.A. : la granda eposo de la suoma popolo « Kalevala ».

Sro Wensing, la respondeca estrarano, raportis pri la intensaj preparlaboroj por la « Instituto por esperanto en komerco kaj industrio » ; komerca terminaro estas kompilata kaj kontaktoj komencitaj.

Novaj eldonoj de Shakespeare en Esperanto

Okaze de la 400-jara datreveno de Shakespeare, aperos tri novaj eldonoj de dramoj de Shakes-

peare en la internacia lingvo. Samtempe aperos en Hispanujo nova versa traduko de « Hamleto » de la konata esperanta poeto Newell, dum en Francujo aperos la oka eldono de la pionira versa traduko de « Hamleto » de la aŭtoro de Esperanto, Zamenhof (unue eldonita en 1894). Ankoraŭ en 1964 la universala Esperanto-Asocio reeldonos aŭ la « Songo de someromeza nokto » aŭ la « Venecia komercisto ».

150-jara datreveno de M. J. Lermontov

Okaze de la 150-jara datreveno de la naskiĝo de la rusa verkisto Lermontov aperos en Nederlando la unua eldono en la internacia lingvo de liaj noveloj « Bela » kaj « Tamenj », en traduko de D. Staritsky.

Muzikaj diskoj en Esperanto

« Hispana Esperanto Instituto », Palaco Markizo de Lilo, strato Montcada n° 12, poŝtkasto 1073, Barcelono-3 komencas eldoni mikrosulkajn diskojn (45 r/m), kun muziko kaj hispanaj kanzonoj en esperanto. Skribu por informo.

En la Nov-Jorka Mondfoiro

Gvidilo kaj mapo en esperanto estis eldonita okaze de la mondfoiro de Nov-Jorko. Petu ĝin (senpage) al « N.Y. Convention » — Visitors Bureau, Inc. Pershing Square, 90 East 42 nd Street, New-York 17.

Elektrona komputilo speciale dungita de skribila kompanio Parker, registros ĉiujn nomojn ricevajn per speciala reklam-kampanjo, kune kun informoj pri la aĝo, sekso, lando kaj interesiĝoj de la korespondopetantoj. Sekve, ĝi en mallongega tempospaco parigos ĉiun petanton kiel eble plej precize laŭ ties postuloj. La sistemo antaŭvidas korespondadon en la nacia lingvo aŭ en Esperanto.

Petu aliĝilon de Parker Pen Co. ; Penfriend Program, Janesville, Wisconsin, Usono.

Pri esperanto en Afriko

Centro de esploro pri Afriko, komisiita de la estraro de Tejo, enketas pri la temo : « Esperanto en Afriko » kaj deziras ricevi : informojn pri tiu temo, adresojn de esperantistoj en Afriko, de afrikaj esperantistoj ekster Afriko, de neafrikaj esperantistoj en Afriko. Skribu al : C.E.A.-P.E.J., ul Dubois 3, Wrocław, Pollando.

Por la sciencaj studentoj

Kreiĝis Studenta Scienca Rondo de esperantistoj ; Adreso : ul. Moniuszki 16/20 D S 3, Torun, Pollando.

Nova fako

La magnetofona sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistoj Foto-kino kaj magnetofonamatoroj (I.L.E.F.), organizo alĝanta al U.E.A., invitas ĉiujn magnetofonamatorojn kiuj emas korespondi per senbendoj (voĉbendoj) sin anonci ĉe la respondeculo de la sekcio : Sro Petro Poliŝĉuk, Novo-Moskovskaja 18, Kv 15, Taŝkent 52, U.S.S.R.

MIRINDA LOKO

Sankta Mikaelo Monto


La franca duoninsulo Kotentin etendiĝas en la maron « Manche », kvazaŭ la unua arkajo de giganta, nefinita aŭ defektita ponto inter Anglujo kaj Francujo.

Laŭ certaj sciigoj, tie la maro akiris unu el siaj plej perfortaj venkoj. La anglaj insuloj, kaj « Chausey » kaj « Minquiers » estas nur supernaĝanta polvo el subakvigita tero. Ĉu okazis malrapida malleviĝo de la tero, kaj, iom post iom, ekokupo de la maro? Ĉu la 709a jaro vidis kontraŭe subitan kataklismon, rapidegan alfluegon, kiel diras la tradicio? Estus malfacile tion precizigi. Sed estas certe, ke tie vasta arbaro etendiĝis ankoraŭ antaŭ la 8a. jarcento. Oni nomis ĝin : la Arbaro de « Scissy », aŭ de Kokland. La memoro de la homoj konservis la nomojn de multaj vilaĝoj superakvigitaj, kies ekzistado estas senduba. Ekzemple la civitoj Helion, kaj Is malaperintaj sub la ondoj.

El tia terura interbatalado de la elementoj naskiĝis pejzaĝo unika en la mondo. Jes, tiu golfeto estas pejzaĝo sensimila. Se ĝi havus nur siajn naturajn strangaĵojn, ĝi tamen estus admirinda. Kion do ni diros post kiam la homa genio venis sin enskribi per senmortaj signoj? Stonego en la arbaro, poste rifo en la maro, preĝejo, abatejo, fortikaĵo, fermita urbo, ŝtata malliberejo, pilgrimejo por kredantoj aŭ por artistoj, la Monto vidis amasiĝi sur tiel malvasta piedestalo ĉiujn grandecojn de l'Historio. Tiel sin glorkronante tra la aĝoj, tiu granitpinto, senfrukta kaj nuda, vidis kreski sur sia dorso miraklan floraron : fortikajn muregojn, turojn, terasojn, kaj ŝtuparojn, gotikajn ĉambregojn sur romanikaj ĉambregoj, kovritan promenejon, preĝejon, sonorilejojn... Tuta amfiteatro de konstruaĵoj, malsupre militaj, supre religiaj, kaj kies suprenleviĝo montras kvazaŭ grandegan deziron al la ĉielo.


Legendo asertas, ke dum la 8a jarcento sankta episkopo Obert, sonĝe trifoje estis vizitata de Sankta Mikaelo, kiu el la ĉielo ordonis al li konstrui kapelon sur la Monto Tomb' (antaŭa nomo de la roko), kie li nepre

deziris esti honorata de la homoj. Jaron post jaro, la kapeleto de la sanktulo iĝis unu el la plej famaj pilgrimejoj en Okcidento. Baldaŭ, la teruro kaŭzita de nordanaj invadoj grupigis la kamparanojn sub la protektado de la fortikaj kasteloj, kaj abatejoj. Tiel naskiĝis, same kiel multaj aliaj, urbeto sur la Monto Sankta Mikaelo. Sed la nordanoj saĝiĝis. Ilia estro « Rollon » edziĝis al la filino de la Reĝo, kaj fondis la duklandon de Normandio. Tiam, komenciĝis por la ŝtonego de la ĉefanĝelo la plej glora epoko de ĝia historio. En 966a. « Rikardo sen timo », nepo de Rollon venigis al la Monto, la Benediktajn monakojn la plej famkonatajn en tiu tempo. La abatejo estis fondita. Ege diversa,



sed tro longa por ni, estus la historio de la Monto tra la jarcentoj, ĝis la Revolucio kiu transformis la sanktejon en malliberejon. Sed, de 1863, eminentaj arkitektoj restarigis ĝin en ĝian belecon. Nun la mirinda abatejo estas Historia-Monumento. Denove la pilgrimantoj laŭiras grandamase la vojojn al marsabloj de la golfeto : ne ĉiuj kun la kredo de la antaŭuloj, sed ĉiuj unuigantaj en la sama sento al Arto, kaj Beleco.

El kie ajn oni venas ĉiuj vojoj konverĝas al la Monto, kaj kunligiĝas en Pontorson, ĉe la bordoj de la rivero « Couesnon », sur l'antikva marŝlando inter Normandio, kaj Bretonio. En la pasinteco, vojaĝo al la Monto estis kvazaŭ aventuro. Oni devis sin gardi



kontraŭ la inundoj de la lim-rivero, kontraŭ la perfidaĵoj de la tajdo, kaj de la moviĝemaj sabloj. Nuntempe, dank'al vojo 7 km. longa sur firma tero, kaj digo 2 km. longa sur la marsabloj, nenia danĝero, nenia tremeto ! Tamen, io tre grava por la vizito de la Monto, estas la epoko : Ĉe la « mortinta akvo », la alfluo apenaŭ atingas la ŝtonegon. Se oni deziras vidi la golfeton en la tuta beleco de ĝia duobla aspekto, oni devas elekti la tempon de « viva akvo », kaj, kiel eble, tiun de la plenluno. La koincido de altaj tajdoj, kun la helaj noktoj lumigitaj de la luno, allasas al la vizitantoj neforgeseblajn impresojn.

Atendante — aŭ rememorante — vizi-

ton, venu kun ni. Pere de tre simpla skizo ni prezentos al vi la Monton Sankta Mikae-lo.

La roko de la Monto havas 900 metrojn da ĉirkaŭo, kaj estas 80 metrojn alta, sed la abatejo, kiu ĝin kronas, suprenaltigas ĝian profilon ĝis pli ol 150 metroj super la marsabloj. Malsupre de la abatejo, la ŝtonego prezentas, norde kaj okcidente, nur krutaĵojn preskaŭ malireblajn, kaj restintajn en natura stato. La arboj de la « Arbareto », tie alkroĉas, malsupre de la gigantaj muroj de la « Mirindaĵo », belan densan verdaĵon, kiu kontrastas agrable kun la griza nudeco de tiom da ŝtonegoj amasigitaj. Sur la orienta kaj suda flankoj, iom malpli krutaj, alkroĉiĝis la urbo. Prem-ĉirkaŭata de remparoj, ĝi amasigis unuj sur la aliaj, siajn malnovajn loĝejojn el granito kaj ligno, tamen apartigitajn, tie kaj tie-ĉi, de malgrandaj ĝardenetoj, ŝtupare aranĝitaj : kvadratoj el alportita tero, kaj ame kulturataj. La urbo posedas nur unu enirejon lerte fortikigita de triobla mallarĝa pasejo. Ĝi malfermiĝas je la nivelo de la marsabloj. Flankita de la posteno « de la burĝoj », unua pordo kondukas en la korton de l' « Avancée », kie oni ankoraŭ vidas la bombardilojn forprenitajn el la angloj en 1434. Oni transpasas la pordegon de la barbakano, kaj fine, oni alvenas al la tria kaj vera pordo de la urbo : ĝi estas la pordo de la Reĝo, belega pro siaj masikulioj, siaj glitfendoj, pro de-

fendkrado kaj siaj ogiv-arkaĵoj, sur kiu oni skulptis la insignon de la abatejo kaj de la urbo. Stona ŝtuparo, ekstere, supreniras al la loĝejo de la Reĝo, nun uzata kiel urbdomo. Kiam oni transpasis tiun pordon, oni sin trovas sur la strato de la Monto, pli ĝuste strateto — mallarĝa, zigzaga, kruta, parte kovrita de poternoj kaj de pordegoj, kun elstarantaj korbeloj, antaŭtegmentoj, ŝildoj balanciĝantaj, kaj kiu grimpas malantaŭ la remparo, volviĝas serpente sur la deklivo de la Monto. Super la strato staras l'absido de la preĝejo sankta Petro (15-a jarcento) traborita de ŝtuparo, kiu supreniras al la tombejo apuda.

(daŭrigota).

B. CHÉVERRY.

LA HISTORIO DE...

La Skota Viskio



La skota viskio pli kaj pli diskonigas en la tuta mondo. Ĝi fariĝis internacia trinkaĵo kaj viro kiu en trinkejo mendas « Scotch » pensas ke li estas moderna homo. Tiu vorto posedas tion, kion la Britoj nomas « snob-appeal » (snob-logo). Sed kiom da tiuj homoj konas la historion de tiu alkoholaĵo, kaj scias kiamaniere oni ĝin fabrikas? Ne nur por tiuj viski-amantoj sed por ĉiuj kuriozemuloj ni rakontos la historion de la « Scotch », hordeo-brando.

La vorto « Scotch » signifas « skota ». Ĝi estas mallongigo de « Scotch-whisky (Skota viskio). La vorto viskio devenas de la gaela « uisge beatha » kiu fariĝis « usquebaugh » kaj poste « whisky » (en Nord-Irlando kaj Usono « whiskey »). Ĉar, fakte, viskio, same kiel la Skotoj devenas de Norda Irlando, kie oni parolis la gaelan lingvon kaj nur dum la 6a. jarcento la Skotoj venis al la iama Kaledonio, nun Skotlando.

Jam en malnova Egiptujo ekzistis « hordeo-vino » kaj en Grekujo hordeo estis grava cerealo. Kelkaj historiistoj eĉ opinias, ke la nomo de la greka diino Demeter devenas de la kreta vorto « deai » kiu signifas « hordeo ». Konsekvence « Demeter » signifas « Patrino de Hordeo ». La devenloko de hordeo estas sud-okcidenta Azio, kaj tiu cerealo ĉiam estis grava nutraĵo por la popoloj. Oni ĝin personginis eĉ diigis. Ebriiĝo per hordeo-brando estis sankta afero ĉe pluraj antikvaj popoloj.

Kiamaniere la sekreto de la fabrikado de hordeo-brando venis de Azio ĝis Irlando tra Egiptujo kaj Grekujo? Tion oni ne tre bone scias. Nur restas irlanda legendo kiu rakontas ke, Sankta Patrick, patrono de Irlando kunportis tiun sekreton el Egiptujo. Fakte, nur la monaĥoj dum longa tempo rajtis fabrikati « aqua-vitae » (viv-akvon) kaj la fabrikado de viskio estis « monaĥeja-sekreto ». En 1505 la reĝo James la 4a de Skotlando, atribuis la monopoleon de la distilado de hordeo al la... barbioj,

ĉar ili estis ankaŭ kirurgoj kaj la « aqua-vitae » estis, iom hipokrite, nomita « medikamenta produktaĵo ». Alia granda dato en la historio de viskio verŝajne estis ankaŭ la batalo de Cul-loden (1746) kiu malfermis al la Angloj la vojon al Skotlando kaj al la skota viskio la vojon al Britujo.

Por fabriki veran viskion estas necese havi torfon en kies fumo sekigis la hordeo, kaj purega skota akvo en kiu komenciĝas la ĝermado. Tiu ĝermado daŭros 8-12 tagojn kaj la hordeo estos ofte sternita kaj aerumita per grandaj plat-taj ŝutiloj. Poste la greno estas miksitaj en grandaj ujoj en kiuj la gluteno fine transformiĝos en sukeron. Post fermentado de la malto, la mosto estas distilita en grandaj distililoj.

La vera viskio estas senkolora. Iam oni kolorigis ĝin per longa restado en kverko-bareloj en kiuj estis alportita al Britujo la hispana ŝerejo. Sed nun oni plej ofte donas al ĝi la tradician koloron per aldono de karamelo.

Tia estas la vera skota viskio, la malto-viskio. Sed oni ankaŭ fabrikas viskion, gren-viskion per distilado de nemaltitaj cerealoj, maizo, aveno, sekalo. Tiu gren-viskio estas multe pli facile kaj rapide fabrikita kaj, sekve, malpli kosta. Sed ĝi ne havas specialan guston kaj ne pliboniĝas per maljuniĝo. Por malaltigi la prezon de la viskio, oni kutime faras miksaĵon de malto-viskio kaj greno-viskio kaj tiu miksaĵo (nur bona por la Angloj, diras la Skotoj) estas la Scotch, kiun oni plej kutime trinkas. La diversaj « scotch » ne havas la saman guston ĉar la proporcioj de la miksaĵo ne estas la samaj.

Kaj por fini tiun historion jen la iama rimedo por kiu la alkoholenteno de viskio. Oni verŝis iom da « scotch » sur nigra pulvo; se, poste, tiu polvo povis flamiĝi la alkohol-enteno estis korekta!

(El artikolo aperinta en « Naturalia »).

Historio de la eta Lando: . .

MONAKO - MONTEKARLO

La Princlando Monako estas sendependa ŝtato situanta sur la marbordo de la franca departemento « Marbordaj Alpoj ». Ĝi havas surfacamplekson de 150 hektaroj.

Privilegiita de la naturo, dotita per natura haveno, protektata de altaj montoj, la regiono de Monako vidis sur sia teritorio la oceanan kaj la romanan civilizaciojn de la Xa jarcento antaŭ Kristo ĝis la unuaj jarcentoj de la kristana erao. Post la falo de la romia imperio ĝi estis invadita de barbaraj hordoj venintaj el Oriento, kiuj poste estis anstataŭitaj de afrikaj Saracenoj depost la fino de la 9a jarcento ĝis la fino de la 10a.

Proksimume 200 jarojn poste, la sorto de tiu parto de la mondo komencis fiksiĝi kiam la Genovanoj ekkonsciigis pri la graveco de tiu regiono, tiele preparante la venon de la Grimaldia dinastio, nun miljara, kiu ŝirmis Monakon kontraŭ la grandaj homaj sortŝanĝoj.

En la jaro 1215, la Genovanoj komencis la konstruadon de la princa palaco kiu origine konsistis el kvin turoj kunligitaj per ĉirkaŭremparo. Delonge ĝi perdis sian aspekton de fortikigita kastelo. Tamen, ankoraŭ nuntempe, la masivaj formoj de la turo nomita « de ĉiuj Sanktuloj » kaj de la bastiono « Serravalle », kiuj estas partoj de malnova ĉirkaŭmuro fermanta la ĝardenojn apike de la kruta roko, rememorigas tiun aspekton.

Karabenistoj gardostaras ĉe la honora pordego meze de la eleganta fasado kaj la ŝanĝo de la gardio, kiu okazas tagmeze, estas spektaklo ĉiam tre admirata, fotata kaj filmata.

Ŝajnas nekredeble ke tiom da belajoj povas esti kunigitaj sur tiel eta teritorio : la marbordo, tre enrandita, estas banata de kristalpura maro. La Alpoj kun kulminoj de 600 ĝis 1100 metroj, formas ŝirmilon kontraŭ la nordaj ventoj. Malantaŭ la arbarkovrita terkapo Cap-Martin illaj ondoformaj linioj pillongigas ĝis Italujo kaj la pinto Bordighera finas ilin ĉe la horizonto per kolorŝanĝanta linio, kiu nokte tute scintillas.

Inter la ondoj kaj la montoj, la Princlando montras siajn blankajn domojn, siajn ĉiam verdantajn ĝardenoj, siajn larĝajn avenuojn, siajn vivadon samtempe plenan de gajejo kaj de laboro.

Por la alilanduloj, Monako-Montekarlo estas ornamita de la brilo de siaj festoj, de luksegaj galaĵoj de la « International Sporting Club », de la vintroteatra sezono dum la operoj kaj la baledoj havas unuarangan rolon, de la somerteatra sezono kiu okazas subĉiele kun neforgeseblaj vesperarangoj de operetoj kaj de varietea teatro.

La Princlando posedas muzeojn kaj ĝardenojn, de kiuj la vizitantoj konservas nepereigeblian memoron.

La Oceanografika Muzeo de Monako, inaŭgurita la 29an de marto 1910 de sia fondinto Princo Albert la 1a, superstaras la maron per sia impona maso.


Tie estas gardataj, laŭ la volo de la Princo

Scienculo, la sciencaj kolektoj rikoltitaj dum liaj kruzadoj. Tiuj kolektoj estas netakseble altvaloraj pro la nombro kaj pro la valoro de la genraj kaj specifikaj « tipoj », kiujn ili enhavas. La ekspoziciaj salonejoj montras konsiderindan nombron da maraj bestoj, ekde la birdoj kaj la marbordaj formoj ĝis la profundmaraj kaj abismaj formoj. Ili montras ankaŭ rimarkindan kolekton de instrumentoj uzataj por la esplorado de la maro kaj ekzemplojn de aplikado de la oceanografio al la maraj industrioj, al la fiskaptado kaj al la biologio.

Sed la multnombra publiko estas ĉefe interesata de la akvario kiu prezentas gravan selekton de mediteraneaj bestoj, de prestiĝaj fiŝoj el la varmaj maroj, mirige koloraj, kaj de tre belaj otarioj el Kalifornio.

Tiu kolekto estas certe unu el la plej gravaj en la mondo kaj ĝia famo estas universala.

En la komenco de ĉi tiu jarcento, Princo Albert la 1a fondis ankaŭ unu el la plej belaj ĝardenoj : la Ekzotika Ĝardeno, kiu ŝajne mirakle alkrutiĝas ĉe la kruta deklivo de la monto. Tie renkontiĝas la plej strangaj kreskaĵoj el la kreitaro kun fan-



Monako

taziaj formoj, specimenoj de la flaŭro el duondezertaj regionoj. Ĉirkaŭ 6000 varioj vivas en tiu mirveka ĝardeno kvazaŭ en sia devena medio. Eĉ, interesinda aparteco estas ke multaj el tiuj kreskaĵoj reproduktiĝas tie per semoj.

Interne de la Ekzotika Ĝardeno troviĝas la enirejo de la « Groto de la Observatorio ». Dum la neolitika epoko la enirhalo de tiu groto estis loĝata de la prahomo. Post eliro de la belega tropika ĝardeno plena de varma sunbrilo, la groto estas haveno de freŝa kaj kvieta atmosfero. Oni vizitas multajn halojn majeste dekoraciitajn de stalagmitoj kaj stalaktitoj senfine diversaspektaj.

En Muzeo de Prahistoria Antropologio estis, antaŭ kelkaj jaroj, translokigita al nova konstruaĵo situanta apud la ĝardeno, por tie gardadi la postrestaĵojn de la prahomoj trovitajn en la princlanda

grundo kaj en la najbaraj regionoj. La altvaloraj kolektoj de la muzeo permesas redesejni, en simplaj linioj, la tutan prahistorion ekde la homorigino. Tie oni povas sekvi la homajn formojn tra la evoluado de longaj sinsekvaj de miljaroj, de la Pithekanthropo ĝis la nuna homo, tra la rasoj de Neandertal, de Grimaldi kaj de Cro-Magnon.

La turistoj satas ankaŭ viziti la Aklimatizan Zoologian Centron de Monako, fondita je la fino de 1954 fare de Lia Suverena Princa Moŝto. Tie loĝas animaloj grandparte originaj el Afriko kaj el Azio. Ili rapide al kutimiĝas al sia nova vivkadro.

(Daŭrigota).

Elfrancisgis kelkaj membroj de la Monaka Grupo.



Li povas senzonge ĝui siajn feriojn
ĉar li REABONIS sian satatan revuon

Kulturaj Kajeroj

MICARD Henri, Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C.C.P. Nantes 2349-62

Vidu la liston de niaj perantoj sur la lasta Kovril-paĝo

EL IE EN LA MONDO

La prapatro de la Radio

Antaŭ sepdek jaroj komencis funkcii en Budapeŝto la eltrovaĵo de fama elektroteknikisto Tivadar Puŝkas : la telefongazeto aŭ telefon-sciigilo.

Puŝkas naskiĝis en 1845 kaj mortis baldaŭ post la funkciigo de lia nova telefonsistemo; do en la nuna jaro ni memoras la sepdekjaran datrevenon de lia morto.

Li estis kunlaboranto de Edison kaj mem inventisto. La plej grava estas la kreo de telefon-centrejo. Li konstruis en Parizo kaj en Budapeŝto la unuajn telefon-centrejojn. Lia telefonsciigilo servis, kiel nuntempe la radio : ĝi donis gazetosciigojn, rakontojn, muzikon, koncertojn kaj mi memoras, kiel ĝoje kaj ofte avide mi aŭskultis per ĝi en nia hejmo operprezentadojn donitajn rekte el la operdomo de Budapeŝto. Ĝi havis centran disaŭdigejon kaj per drato oni kreis kontakton kun la abonantoj. Ĉar ĝi

estis uzebla nur en dekkilometra ĉirkaŭaĵo, ĝi ne disvastiĝis kaj ĝia uzado iom post iom malvastiĝis, kiam la radio sen dratoj plenumis ĉiam pli bone kaj pli facile la saman rolon. En malgranda skalo ĝi estas ankoraŭ funkcia en la hungara ĉefurbo kaj per ĝi aro de malsanuloj havas en la hospitaloj distraĵon. Tiutempa ĵurnalo skribis pri la « parolanta ĵurnalo », ke « ĝi faris Budapeŝton la unua urbo de Eŭropo ». Pri uzado de progresaj inventaĵoj povis fieri nia urbo, ĉar, ekzemple, sur la kontinento, tie ekfunkciis la unua subtera fervojo en 1896.

Inter la inventaĵoj kaj ideoj de Tivadar Puŝkas estis kelkaj tiutempe nerealigitaj kaj oni povas diri pri li, ke li antaŭiris sian epokon. El tiuj estas tiaj, kiajn oni nun jam finlaboris kaj ekfunkciigis, sen utiligo de liaj iamaj projektoj.

Paĉ BALKANYI.

Barro Colorado

Kio ĝis estas? Enciklopedioj kaj atlasoj scias nenion pri ĝi. Sed ĝi estas unu el la plej interesaj geografiaj punktoj sur nia terglobo. Jen kelkaj informoj pri ĝi ĉefe laŭ la verko de Per Host : Frein Ishav till djungel.

Kiam oni konstruis Panama-kanalon, oni baris per digo riveron Roi Chagre. Iom post iom akvo plenigis la valon de la rivero formante 425 km² vastan lagon, kiu ricevis nomon Gatun. En ĝia mezo formiĝis 25 km² vasta insulo. La subakviĝinta regiono estis riĉa je tropikaj kreskaĵoj kaj bestoj, kiuj trovis rifugejon sur la insulo. Tiel fariĝis giganta zoologia ĝardeno, en kiu kreskas abunda tropika vegetaĵo kaj vivas multege da diversaj bestoj. Nacia muzeo de Vaŝingtono ricevis la insulon en sian posedon kaj fondis tie biologian esplorstacion Barro Colorado. La stacio estas mirinde ideala. Oni povas eĉ tra la fenestroj de la stacio fotografadi la bestojn kaj esplori ilian vivon.

En la arbaro kreskas tiel grandegaj arboj, ke en la kavaĵoj sub iliaj radikoj povus elefantoj sin kaŝi. Famaj balsa-arboj floras dum 3-4 monatoj. La floroj similas al 20 cm florvazoj, kiuj matene enhavas bongustan sukon. Ĉiuj bestoj havas sian propran manieron por akiri tiun ŝatatan trinkaĵon. Simioj prenas la pokalon kaj trinkas kiel homoj sed kelkaj birdoj boras true-ton en la vazon kaj suĉas tra ĝi la sukon.

Inter la bestoj ekzistas i.a. pli ol dume-ta lacerto kaj alia pli malgranda, kiu kapablas kuri sur akvonivelo. Negroj adoras ĝin kaj nomas Jesuo Kristo-lacerto. Bru-simioj kondutas multmaniere kiel homoj, sed hontemon ili ne konas. Ĉiujn intimajn taskojn ili faras en ĉies ĉeesto. Ĉar ĉiuj bestoj estas pacigitaj ili ne timas homojn, sed rigardas ilin same kiel homoj rigardas bestojn en zoologia ĝardeno.

Hannes KOIVU.

LEONARDO DA VINCI EN TURANĜIO

(Resumo de prelego farita en Grésillon dum la Kultura Semajno

31 an de marto — 7 an de aprilo 1964)

Dum bela printempa tago de la jaro 1516, la suno orumas la verdigantajn montetojn, inter kiuj majeste fluas la rivero Loire. Jam de fruaj horoj, ĝoja homamaso surŝutiĝis sur la bordo de la rivero, antaŭ la reĝa kastelo de Amboise. Iom ekscite, grupoj babilas.

Subite, granda krio : « Jen ! Ili alvenas ! ».

Trumpeta signalo. Riĉe vestitaj heroldoj galopas antaŭ la atendantaro, ĝin ŝovas al la piedoj de la domoj, kriante : « Lokon ! Lokon por Lia Reĝa Moŝto ! ».

Baldaŭ aperas luksa kaj pompa rajdantaro. Tondras aklamoj : « Vivu ! Vivu ! Vivu la Reĝo ! Vivu nia Sinjoro Francisko ! ».

La viroj nudkape riverencas ; la virinoj surgenuas kaj krucoŝignas.

Estas la alveno de Reĝo Francisko Ia, revenante el Italujo, kie li venke reakiris Lombardujon.

La belega procesio jam preterpasis la homamason, kaj eniris la reĝan kastelon.

Sed, unu demando instigas ĉies scivolemon. « Kiu estas tiu majesta maljunulo kiu tiel intime parolas kun la Reĝo ? ». Belstatura, pli alta ol la aliaj kavaliroj, lian vizaĝon enkadrigas longaj argentaj haroj, abunda barbo falas ĝis la mezo de la brusto. La viro, kvankam ŝajne almenaŭ sesdekjara elradias per fortikeco, eleganteco kunigitaj kun esprimo de digna majesto kaj evidentaj bonvolemo kaj boneco. La reĝo montras al li senliman respekton. Iu aŭdis Franciskon nomi lin « mia patro ». Ĉu li estas itala grand-sinjoro ? Eble iu reĝo ?

Neniel. Li estas la famega itala artisto Leonardo da Vinci « pentristo kaj arkitekto de la Reĝo de Francujo ».


Efektive, la juna reĝo Francisko reagligis la deziron de sia patro, Ludoviko XII a. : venigi la renoman artiston en Francujon.

Kiu estas tiu Leonardo ? Li naskiĝis en 1452 en la kastelo de Vinci, situanta inter Florenco kaj Pizo. Li estis neleĝa filo de notario Ser Piero kaj de juna kamparanino, Katarina. Pro malhelpo de liaj gepatroj, Ser Piero ne povis edziĝi al sia amatino. La saman jaron, li edziĝis laŭ la deziro de la gepatroj, kaj Katarina fariĝis la edzino de iu kamparano. Si men vartis la junan Leonardo dum kvin jaroj. Tiam, Ser Piero prenis la infanon kun si, kaj lin bone edukigis.

La junulo, tre inteligenta, montris grandan emon al desegnado kaj pentrado. Iam Ser Piero montris desegnojn de Leonardo al sia amiko Verrochio, fama pentristo, arkitekto kaj muzikisto. Tiu-ĉi komprenis la kapablojn de la junulo, kaj akceptis lin kiel lernanton.

Leonardo rapide fariĝis lertega artisto, kaj eĉ superis la mastron. Plie, li studadis konstante, kaj akiris preskaŭ universalan scion, kaj mastris preskaŭ ĉiujn tiamajn artojn kaj sciencojn.

La nobleco de lia karaktero, lia kora bonvolemo



al ĉiuj, la prestiĝo de liaj neordinaraj beleco kaj forteco, la ĉarmo de lia konversacio, alligitaj al liaj senkomparaj scio kaj artemo, ĉiuj tiuj raraj kvalitoj tiom malofte kunligitaj, donis al li allogan kaj superordinaran personecon.

La migro de la itala artisto en nian landon estis logika rezulto de lia situacio rilate al la franca reĝo. De jam 15 jaro, li estis oficiale dungita « je la servo de la reĝo de Francujo ».

En 1499, Ludoviko XII a. konkeris Lombardujon post mallonga milito, kaj eniris en Milanon. Tie, Leonardo estis prezentita al li. Fulmrapide, naskiĝis granda amikeco inter la du viroj. Amikeco pruvita de iliaj literaj rilatoj, de multaj mendoj faritaj de la reĝo aŭ de lia reprezentanto en Milano, kaj precipe de la oficiala titolo « pentristo kaj skulptisto de la Reĝo de Francujo ».

Jam Ludoviko penas venigi la artiston en nian landon, sed vane. Tamen, Leonardo laboras por la franca reĝo pri konstruado de kanaloj, endigigo de riveroj, krom pri diversaj pentraĵoj.

En 1513, Maksimiliano Sforza decidis reakiri la duklandon de Milano, kaj venkas la francan armeon ĉe Navaro. Nedaŭra venko. Apenaŭ du jarojn poste, Francisko I a. per la batalo de Marignano, restarigis la francan suverenecon.

Al la artisto, la juna reĝo refaris la proponon de sia patro. Leonardo venu Francujon. Li ricevos, kiel loĝejon, la kasteleton « Cloux » (nun Clos-Lucé) tute apud la reĝa kastelo en Amboise, kaj pensionon de 700 eskudoj. Vere reĝa donaco.

Ĉi-foje, Leonardo konsentis. Li ja suferis akrajn opojn de aliaj artistoj, ĉefe de la fama Mikaelo-Angelo. Li ekmalfavoriĝis de papo Leono Xa. Li mal-

juniĝis, estis laca. Reŭmatismo preskaŭ paralizis lian dekstran manon — kio ja estis grava ĝeno, sed ne malhelpo, ĉar li kutime skribis, desegnis, pentris per la maldekstra mano. Lia nescio de la franca lingvo ne estis obstaklo, ĉar en Amboise, jam vivis italaj artistoj dungitaj de Ludoviko XIIa ; kaj lin akompanos lia amata disĉiplo Francesco Melzi kaj fidela servisto Batista de Villanis.

Cetere, la laborema geniulo tute ne intencis senfari reposedojn en tiu bela Turangio, kies kvietaj pejzaĝoj memorigis al li la lombardan landon. Efektive, la tri jarojn, kiujn li pasigis en Francujo, estis fekundaj.

Dum tiu mallonga restado en Amboise, li ellaboris ampleksan planon pri la sekigo kaj fekundigo de la najbara, preskaŭ dezerta Sologne. Li verkis projekton de belega palaco anstataŭonta la tiaman reĝan kastelon. Li ankaŭ kompletigis siajn manuskriptojn, multe desegnis. Spite malbonigitan faturan li finfinis du el siaj plej konataj ĉefverkoj : Monna Lisa del Giocondo kaj Sankta Johano-Baptisto.

La multflanka genio de Leonardo ne nur montriĝis per artaj ĉefverkoj, sed ankaŭ per nombraj inventoj. Li antaŭvidis la aŭtomobilon, la aviadon, la submaran navigacion. Oni povas diri ke, en liaj manuskriptoj, estas troveblaj la ĝermoj de plej multo el niaj modernaj maŝinoj. Eĉ li trovis la kaŭzon de tiu « griza lumo » de la luno, kiu dum jarcentoj perpleksigis la astronomojn.


Li mortis la 2 an de Majo 1519 en la kasteleto Clos-Lucé. Oni enterigis lin en preĝejo Sankta-Florenteno, nun malkonstruita.

Post zorgaj esploroj, la franca verkisto Arsène Houssaye, en 1863, trovis skeleton, kiu ŝajne estas tiu de la fama geniulo. Sed neniu efektiva pruvo ekzistas.

Tial nun, oni povas vidi en tiu gotika juvelo de la kastelo de Amboise la Kapelo Sankta-Huberto, maldekstre de la transepto, tombŝtonon, sur kiu estas legeblaj tiuj vortoj : « Sub tiu ŝtono kuŝas restaĵoj kolektitaj en la malnova kapelo de Amboise, inter kiuj, supozeble, troviĝas la mortrestaĵoj de Leonardo de Vinci, naskiĝinta en 1452, mortinta en 1519 ».

Se jam vi vizitos niam belan landon, nepre vizitu la reĝan kastelon de Amboise kaj la apudan kasteleton Clos-Lucé. Tie, vi ja ne vidos la renomajn ĉefverkojn de Leonardo, ĉar ili estas disigitaj en la tuta mondo, en muzeoj kaj bibliotekoj. Sed vi vidos manuskriptojn, maŝinojn kaj multajn memoraĵojn, kaj ricevos drastan impreson pri tiu senkompara viro, neniam egalita en la tuta mondhistorio.

E. Motillon.



Poŝtofiĉejo en Amboise
Barielejo de Janthial

« Francisko I-a kaj Leonardo da Vinci »

GRAVAJ



DATREVENOJ


Antaŭ 400 jaroj mortis en Genevo

Johann CALVIN. La franca reformanto ĉefe aktivis en Genevo. Li establis severan eklezian disciplinon. Calvinismo diferencas de la aliaj protestantaj doktrinoj per la dogmo de Antaŭdestinismo kaj malsimila interpreto de « Eŭkaristio ». Calvin altiris la kredantojn al aktiva partopreno en la paroka vivo.



Antaŭ 80 jaroj mortis en Praha

Frederich SMETANA. La ĉeĥa komponisto estis dum kelkaj jaroj direktoro en Goteborg. Li revenis en Praha en 1861 kaj fariĝis orkestrestro ĉe la ĉeĥa Nacia Teatro. Jam, oni konsideris lin unu el la plej grandaj komponistoj. Lia muziko situas inter la pasia varmeeco de populara liriko kaj arta beleco. Al Smetana ni dankas operojn, sinfoniojn kaj ĉambro-muzikon.



Antaŭ 60 jaroj mortis en Praha

Anton DVORAK. Dum du jaroj li ludis dancmuzikon en orkestro kiel violonisto. Li poste estis direktoro de la konservatorio en Nov-Jorko (1892-1895) kaj de post 1901 de la konservatorio en Praha. Lia muziko — operoj, sinfonioj, ĉambro-muziko, kantoj — estas originala, melodia kaj harmonia. Ĝi kunigas la germanan romantikon kun elementoj de la populara ĉeĥa muziko. Lia « Sinfonio de la Nova Mondo » estas unu el la plej konataj muzik-verkoj.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Pro eraro de la presejo aperis nur unu problemo en la lasta numero de Kulturaj Kajeroj. Ni petas la konkursantojn bonvoli nin senkulpiĝi.

Ni esperas, ke ĉiuj interesatoj ne forgesis sendi siajn solvojn al Sro Chevalier, 19, boulevard G.-Lauriol, Nantes (L.-A.). La rezultatoj de tiu konkurso aperos en la venonta numero, sed la gajnintoj ricevos apartan sciigon. Kiu gajnis la senpagajn restadojn en Grésillon? Tion vi baldaŭ scios. La solvoj de la problemoj proponitaj estos senditaj al la petintoj.

AMUJAJ PROBLEMOJ

(Sro Jarlier kaj Sro Salasc)

Solvo de la lasta problemo : La ducifera nombro Aritmetika solvo :

La cifero de la unuaj estas pli granda ol tiu de la lastaj ĉar la nombro pliĝas kiam oni renversas la ordon de la ciferoj. La sumo de la du ciferoj estas 7 ; do la ciferoj povas esti nur :
 $1 + 6 = 7 \quad 2 + 5 = 7 \quad 3 + 4 = 7$

La nombro povas esti :

— 16 (renversita 61 - diferenco 45) ne konvenas ;

— 25 (renversita 52 - diferenco 27) ne konvenas ;

— 34 (renversita 43 - diferenco 9) ne konvenas.

Respondo : 34

★

Algebra solvo :

Estu « x » la cifero de la unuoj !

« 7 — x » estas la cifero de la dekoj

La nombro estas $10(7 - x) + x$

$$\begin{aligned} \text{La nombro renversita estas } 10x + 7 - x \\ 10x + 7 - x (10[7 - x] + x) = 9 \\ 10x - x + 10x - x = 9 - 7 + 70 \\ 18x = 72 \\ x = \frac{72}{18} = 4 \end{aligned}$$

$$7 - x = 7 - 4 = 3$$

Respondo : 34

NOVAJ PROBLEMOJ

La brigo : Oni brigas kvarope. Komence de la ludo du ludantoj posedis : la unua 1.000 frankojn, la dua 400 frankojn. Post la ludo la unua malgajnis duoblon de la dua. Tamen la unua posedas la trioblan sumon de la dua. Kiom da frankoj la du ludantoj malgajnis?

Serpentmova proverbo : Laŭ la sekvantaj difinoj, trovu 28 vortojn kvinliterajn (esceptokaze, la 24a estas seplitera). Tiujn vortojn vicigu — kolumne — de supre malsupren, unu sub la antaŭa. La literoj aperigontaj la kaŝitan proverbon estos en ĉi tiu ordo : la unua de la unua vorto, la dua de la dua vorto... la kvina de la kvina vorto, la kvara de la sesa vorto, la tria de la sepa vorto... la unua de la naŭa vorto, la dua de la deka vorto, ktp..., ĉiam zigzagante.

DIFINOJ

1. Monato ; 2. Aŭreolo ; 3. Senhara ; 4. Karesema nomo ; 5. Sirmita ; 6. Korpomembro ; 7. Sankta bildo ; 8. Granda loko ; 9. Birdhejmo ; 10. Skatolego ; 11. Talka ŝtono ; 12. En ludkarto ; 13. Neagema ; 14. Homkorpa parto ; 15. Inteligentprovo ; 16. Islama guberniestro ; 17. Okulparto ; 18. Korta naĝbirdo ; 19. Tajdtempo ; 20. Haŭtsulketo ; 21. Regiono ; 22. Motora malfunkcio ; 23. Mambesteto ; 24. Ekzekutilo de krimuloj (seslitera radiko) ; 25. Juvelŝtono ; 26. Rapida militŝipo ; 27. Mambesteto ; 28. Ins-trui beston.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« Se du komplementoj estas ligitaj per la vorto « kiel », tiam mi ordinare akordigas kaze la sekvantan komplementon kun la komplemento antaŭiranta, ĉar alie la senco estus tute alia kaj la nominativa komplemento sence rilatus ne al la antaŭstaranta komplemento sed al la subjekto de la frazo. « Mi elektis lin kiel prezidanto » signifas : « Mi elektis lin, ĉar mi estas prezidanto »... « Mi elektis lin kiel prezidanton » signifas « kiel mi elektas prezidanton », aŭ « por havi en li prezidanton ».

L.L. ZAMENHOF -- Lingvaj Respondoj.



— Mi ricevis 50.000 dolarojn por labori en Usono, kiel oficiala pentristo.

— Vi ricevis ilin de Eŭropo, kompreneble ?



— Bonvolu akcepti tion, kiel donacon okaze de la reveno de via naskiĝdato.



— Ĉu mi povas daŭre konsideri lin kiel inteligentan vivon ?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (50 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).

Cehoslovakio : S-ro Valentin Kibalčič, TICHY POTOK, p. Brezonica n/T.

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).

Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO.

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komĉnskega 7, LJUBLJANA, Poŝtfako 239 (900 d.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).

Svedujo : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö, Postgiro : 157007 (6 kr.).

Ŝvlando : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adreso).

Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuala iam ajn karavanojn frue anoncitan

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
 Por ekleri aŭ plulerni la internacian lingvon ;
 Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
 Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
 Por studi specialajn problemojn ;
 Por inter amikoj gaje libertempi ;
 Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo